

STARTO

N-ro 3/2023 (288)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



La 108-a UK en Torino

Sube ĉeĥa grupo

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retroŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marček: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupu@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:
muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ČES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.chaloupkova@esperanto.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

UK Torino

Al la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en la itala urbo Torino (29.7.-5.8.) veturis ĉeĥaj esperantistoj sub influo de penso, ke post tri jaroj en 2026 okazos UK verŝajne ankaŭ en Ĉeĥio, sekve necesas atente observi, kio estas necesa por organizi tian eventon.

Partoprenis sume 1318 personoj el 69 landoj. La kongresa temo estis: *Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj*.



Kiel kongresejo estis elektita politeknika universitato Politecnico, malantaŭ kiu troviĝis universitata manĝejo kaj apude granda salonego por ĉiuj kongresanoj, kiu por la kongreso ricevis nomon salono Zamenhof - tie okazis solenaj malfermo kaj fermo kaj artaj vesperoj. Laŭ gravaj forpasintaj esperantistoj estis nomitaj ankaŭ la korto (Bourlot), ĉambro por aŭtoraj duonhoroj (Pettyn) kaj libroservo (Conterno), super ĝi scenejo por koncertoj kaj teatraĵoj (Lapenna), ĉambro por KER-ekzamenoj (Aguilar-Sola) kaj prelegejoj (maldekstre Fighiera-Sikorska, Canuto, Hodler, dekstre Grattapaglia, Clerici, De Salvo).

Antaŭ la libroservo estis aranĝita la akceptejo kaj ankaŭ la afrika tablo invitanta al la venonta kongreso en la tanzania Aruŝo.



Sabate la universitata korto pleniĝis per tabloj (Mova-da Foiro), kie la landaj kaj fakaj asocioj povis prezenti siajn materialojn (sed ne vendi librojn, tio estas ekster la libroservo severe malpermesita). Ĉeĥa tablo estis komuna kun KAVA-PECH kaj hungara asocio.



Dimanĉe je la 10-a horo en la salono Zamenhof okazis solena duhora programo, kiu finiĝis per inaŭgura malfermo de la kongreso kaj tuj poste la kongresanoj kolektiĝis antaŭ la domo por komuna fotado. Dum la inaŭguro estis nomumitaj novaj honoraj membroj, pri kiuj ni informos detale. La kutimaj landaj salutoj estis anstataŭigitaj per salutoj kontinentaj, kio mallongigis tiun programeron.

Post la tagmanĝo komenciĝis klasika kongresa programo (prelegoj, kursoj, koncertoj), vespere en la salono Zamenhof ĉiuj ĝuis Nacian Vesperon de la gastiganta lando. Similaj programoj daŭris ankaŭ lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede, sole merkredo estis dediĉita al tuttagaj ekskursoj. Ĵaŭde nin ĝojigis la junulara teatra grupo DOMA el Svitavy kun du spektakloj, nome *Ludoj kun diablo* de Drda kaj *Reĝo Lávra* de Karel Havlíček Borovský.



Vendrede multaj kongresanoj submetiĝis al KER-ekzamenoj kaj serĉis refreŝigon en Arta Vespero. Kaj sabate solena fermo la kongreson finigis.

Nun iomete pli detale.

Programoj

Pri la kongresa temo **Enmigrado - kunfluo de homaj valoroj** estis prezentitaj prelegoj: *Klimatŝanĝo, militoj, mizero: kreskanta premo elmigri. Sen migrado nenia evoluo. Kartografio de transnaciaj migradpadoj. Migrado kaj integriĝo. Ĉu Esperanto povas helpi?*

Internacia Kongresa Universitato (IKU): *Kvantuma interplekto. Kikonga lingvaro. Lingva pejzaĝo en lingve diversecaj urboj. Novaj esploroj pri la Serĉo de Ekstertera Vivo. Boulton - Shakesperare - Koriolano. Torino kaj Academia pro Interlingua. Reguleco kaj nereguleco en la homa lingvo. Klimata Ŝanĝo kaj Hidrogena Ekonomio. La DNA de Esperanto. Robotoj alvenas. G. J. Ramstedt. Fizikaj kaj kemiaj karakterizoj de gemoj. De la pedagogio ĝis la neŭropedagogio. La arkivo de UEA. La Atendo. Nuntempaj projektoj kaj ŝancoj de mondregeco. La unuaj manlibroj kaj vortaroj de Esperanto. La danĝera lumo. La matematikaj kalkuliloj.*

Oni povis elekti ankaŭ Paroligajn kursojn, koncertojn de jOmO (JoMo), Ĵomar kaj Nataŝa, Kajto, teatraĵon pri la vivo de Zamenhof, bonhumorajn kaj satirajn scenojn de Georgo Handzlik kaj Saŝa Pilipoviĉ, magiston, eĉ futbalan matĉon, minikurson de la itala, projekton Erasmus, prelegojn: pri Italio, Kio nova ĉe Esperanto Studies Fondantion? Kio farendas? Misinformado kaj kiel sin protekti, tabloludo La cent paŝoj, luktoarto Aikido, Kian rolon havu Esperanto ĉe ĝemelaj urboj?

Ekskursoj proponis Milanon, Alban, Ĝenovon, Aostan valon, kastelon Masino, fervojan muzeon, lagon Maggiore, muzeon Lavazza, sanktejon San Michele, muzeon Martini, palacon de Venaria Reale, kastelon de Rivoli, piedirajn ekskursojn en Torino.

Rezolucio de la 108a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio

La 1 318 partoprenantoj de la 108a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniam lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.

2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke

pro la klimatsanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.

3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.

4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.

5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948.

6. Nun, en la jaro de la 75a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo, ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.

7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj, kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

Torino, Italio, 5 aŭgusto 2023



Salutvortoj de Andrea Bocelli

(Mondkonata kantisto)

Mi deziras transdoni miajn plej korajn salutojn kaj bondezirojn por fruktodona laboro al ĉiuj partoprenantoj en la 108-a Universala Kongreso de Esperanto: evento de eksterordinara graveco, kies okazigo ĉi-jare en Italio min orgojligas, kaj en kies Honora Komitato (pro nemeritita privilegio) aperas mia nomo. Mia ĉefa pasio, transformita en mian profesion de ĉirkaŭ tridek jaroj, konstante igas min esplori la formojn de esprima komunikado kaj la muzikecon kunnaskitan en la multaj lingvoj en kiuj mi kantas. Krom tio, mi havas agrablan memoron pri mallonga periodo, dum kiu mi adoleska havis kiel pianoinstruiston pasian esperantiston (kies nomo estis Carlini), el kiu mi lernis kelkajn rudimentojn de tiu ĉi genia internacia lingvo.

Sed mi ne estas lingvisto, kaj mi preskaŭ ne havas specifajn kapablojn, tiajn ke mi aŭdacu hazardajn pripensojn, kapablajn fari eĉ la plej etan akceladon al la hodiaŭa kongresa laboro. Tamen mi nepre deziras esprimi mian tutan simpatian al idiomu, kiu – same kiel bonkvalita muziko – disbatas barojn kaj konceptigis laŭstatute por kunigi, por faciligi la dialogon inter la popoloj.

Antonomazie universala lingvo, Esperanto kuntrenas filozofian projekton kaj etikan plusvaloron kun eksterordinara kvalifiko. Naskita el revo, nenies unua lingvo kaj do potencie ĉies dua lingvo, aldone mi amas Esperanton, ĉar ĝi portas eĉ en sia nomo la forton de atendo, de fido al la homaro kaj al la

kapablo venki la evoluon de konflikto (kiu estas, ĉiam kaj en ĉiuj ĝiaj formoj, nenio alia ol intelekta akcidento).

Paco en si mem estas la plej oportuna kaj evidenta afero, kiun la homaro devus celi. Nu, mi opinias, ke Esperanto povas alporti signifoplenan helpon al ni ĉiuj, kunloĝantoj de la tero, por atingi tiun celon, por transformi la revon en realon.

La ekzemplo mem – kvankam neglektinda – de mia ekzista kaj profesia vojo konfirmas tion, je kio mi firme kredas: nome, ke ne ekzistas malebla revo. La esenco estas kredi je ĝi kaj strebi al ĝi kun forto, intelekta honesteco kaj disciplino. Ĝuste kiel vi faras, subtenante per viaj studoj, per via inteligenteco kaj volo, tiun revon – ĉiam pli proksiman kaj konkretan – pri lingvo komuna al la popoloj de la mondo.

Nova honora prezidanto de UEA

Renato CORSETTI naskiĝis la 29-an de marto 1941 en Romo. Li estas esperantisto ekde la 1960-aj jaroj. Li havis multajn postenojn en la movado, estis interalie prezidanto de TEJO kaj prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio.



En UEA li deĵoris en la Estraro de 1980 ĝis 1986 kaj 1998 ĝis 2007, la lastajn ses jarojn kiel Prezidanto de UEA. En 1998 li estis elektita membro de Akademio de Esperanto kaj ekde 2020 li denove anas en la skipo de lingvaj konsilantoj de Monato. Li verkis en Esperanto kaj en la itala pri lingva politiko, Esperanto, infana dulingveco, psikopedagogio de lingvo kaj komunikado. Li jam estas honora membro de UEA kaj honora prezidanto de TEJO.

Novaj honoraj membroj de UEA

D-ino Katalin KOVÁTS naskiĝis en Budapeŝto, la 16-an de oktobro 1957. Ŝi estas hungara esperantisto, pedagogo, lingvisto kaj instruisto. Ŝi estas fondinto en 2001 kaj redaktoro de la paĝaro Edukado.net; estis ano de la Akademio de Esperanto de 2007 al 2022; kaj Esperantisto de la Jaro en 2010. En UEA ŝi estas ekde 2009 la motoro de la Ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER-ekzamenoj) kaj same unu el la ĉefaj profesoroj de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz. Ŝi verkis diversajn instruelajn verkaĵojn, inter kiuj furoras Poŝamiko. En 2005 ŝi tradukis la memtaksilon de la KER-ekzamensesio kaj aperigis ĝin el la Manlibro pri instruado de Esperanto, kiun ŝi redaktoras. Ŝi estas dumviva membro de UEA.



Anna LÖWENSTEIN naskiĝis en Britujo en 1951. Ŝi estas esperantisto, redaktoro kaj verkisto. Ŝi estis elektita Esperantisto de la Jaro 2019. Löwenstein laboris en la Centra Oficejo de UEA de 1977 ĝis 1981, kie ŝi redaktis la Jarlibron de UEA en 1981. Ŝi estis redaktoro de la facila parto de Kontakto (kaj krome verkinto de la listo de 1000 morfemoj uzataj en la facila parto) de 1983 ĝis 1986. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto ekde 2001. En UEA ŝi estas la fondinto kaj motoro de



la Movada Foiro en la UK-oj. En 2019 ŝi kreis <https://uea.facila.org>, retejon kun mallongaj kaj facilaj artikoloj por novaj esperantistoj, kiun ŝi ĉefredaktoras. Ŝi partoprenis en pli ol 28 eldonoj de UK kaj estas membro de UEA de pli ol 40 jaroj.

Privas TCHIKPE naskiĝis en Benino en 1963. Krom Esperanton, li parolas la aĝaan, la fonuan, la francan kaj la anglan. Li esperantistiĝis en 1981 kiel la unua esperantisto en Benino. Kun kelkaj amikoj siaj, al kiuj li instruis Esperanton, li fondis en la jaro 1983 la unuan landan asocion de Benino, Beninan Esperanto-Asocion, agnoskitan de la Ministerio pri



Internaj Aferoj. En la jaro 2009 li fondis kun Mireille Grosjean el Svislando la asocion Scio Sen Bariloj (SSB), neregistaran organizon, kiu laboras por ebligi aliron al lertigado de homoj. Kerna agado de SSB estas la disvastigo de Esperanto kaj virina kapablo al gvidaj roloj. En 1991 li organizis kiel prezidanto de LKK sukcesan duan Afrikan Kongreson de Esperanto en Kotonuo, kun partopreno de dekoj da eksterafrikaj esperantistoj. En 2013, li denove estis prezidanto de la Kongresa Organiza Komitato (KOKo) respondeca pri la okazigo de la kvina Afrika Kongreso de Esperanto. Okaze de 104-a UK en Lahti, Finnlando, en 2019, li ricevis Diplomon pri Elstara Agado de UEA rilate al sia gvidado de Scio Sen Bariloj. Li estas dumviva membro de UEA.

laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

Pliaj detaloj en Vikipedio.

Belartaj Konkursoj de UEA en 2023

Okaze de la 74-a eldono de la BK estis ricevitaj entute 180 verkaĵoj.

BRANĈO POEZIO

Partoprenis 51 verkoj de 29 aŭtoroj el 18 landoj [7 el Afriko, 4 el Azio, 9 el Ameriko, 29 el Eŭropo, 2 el Oceanio]

1-a premio: *Danco makabra* de Nicolino Rossi el Italio.

2-a premio: *Murditaj floroj* de Evgenij Georgiev el Kazahio.

3-a premio: *La kastelo Raseborgo en aŭgusto 1993* de Jouko Lindstedt el Finnlando.

Honora mencio: *Kovrilo* de Evgenij Georgiev el Kazahio.

Honora mencio: *Difini la morton* de Jouko Lindstedt el Finnlando.

BRANĈO PROZO

Partoprenis 42 verkoj de 26 aŭtoroj el 16 landoj [5 el Afriko, 5 el Azio, 9 el Ameriko, 23 el Eŭropo].

1-a premio: *Elemér ripozu pace* de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

2-a premio: *Mia amiko Timoteo* de Tobiasz Kubisiowski el Pollando.

3-a premio: ne aljuĝita.

Honora mencio: *Matĉjo iĝis Sinjoro Dobroz* de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

Honora mencio: *Nupto* de Carlo Minnaja el Italio.

Honora mencio: *Artinspiroj* de Ewa Barbara Grochowska el Francio.

BRANĈO MIKRONOVELO

Partoprenis 59 verkoj de 28 aŭtoroj el 18 landoj [16 el Azio, 12 el Ameriko, 32 el Eŭropo].

1-a premio – premio Paula Adúriz: *La nuklea erao* de Christian Rivière el Francio.

2-a premio: *La dormanta belulino* de Laure Patas d'Illiers el Francio.

3-a premio: *Fredo Malaperis!* de Debra Hamel el Usono.

Honora mencio: *Mia korpo* de Anastasia Bausk el Rusio.

Honora mencio: *Mi kaj li* de Francisco Javier Moleón el Hispanio.

BRANĈO TEATRAĴO

Partoprenis 1 verko de 1 aŭtoro el 1 lando [1 el Eŭropo].

1-a kaj 2-a premioj ne aljuĝitaj.

3-a premio: *La Manĝejo de la Kvarfolio* de Raffaele Del Re el Italio.

SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO

Partoprenis 3 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj [1 el Azio, 2 el Eŭropo].

1-a premio – premio María Cuevas –: ne aljuĝita.

2-a premio: ne aljuĝita.

3-a premio: *Kromnomo* de Ewa Barbara Grochowska el Francio.

Honora mencio: *10-20-40-80* de Amir Naor el Israelo.

INFANLIBRO DE LA JARO

Partoprenis 2 infanlibroj de 2 eldonejoj el 2 landoj [ambaŭ el Eŭropo].

La premio “Infanlibro de la jaro”: la Eldonejo “Verda Stelo Esperanto Asocio Nyíregyháza”, pro la verko *La malbela knabineto* de Veronika Marék, tradukita de János Sárközi.

BRANĈO ESEO

Partoprenis 11 verkoj de 9 aŭtoroj el 8 landoj [7 el Eŭropo, 4 el Ameriko].

1-a premio - premio Luigi Minnaja - ne aljuĝita.

2-a premio: *Kunfluo de homaj valoroj en la verkaro de migranto Trevor Steele* de Carlo Minnaja el Italio.

3-a premio: ne aljuĝita.

Honora mencio: *ChatGPT: Ĝi vomas ĉion, krom genio* de Brandon Sowers el Usono.

BRANĈO KANTOTEKSTO

Partoprenis 11 verkoj de 7 aŭtoroj el 7 landoj [1 el Afriko, 1 el Azio, 9 el Eŭropo].

1-a premio estas aljuĝita en egaleco al la verkoj: *Nia kato* de Tomas Frejarö el Svedio, kaj al *Bilbok-logoj* de Serge Sire el Francio.

2-a premio: *Nun komenciĝas nova viv'* de Tomas Frejarö el Svedio.

3-a premio: *Jetio* de Evgenij Georgiev el Kazahio.

Honora mencio: *Ni kantos en teamo* de Antonio Valén el Hispanio.

Filmo kun la kompleta rezulto spekteblas ĉe: <https://youtu.be/CIUamy7RoJw>

UEA gratulas al ĉiuj agnoskitoj kaj kuraĝigas ĉiujn partopreni en la 75-a eldono de la BK kaj en la aliaj artkonkursoj ligitaj al Esperanto. Ĉiuj ankaŭ estas kuraĝigataj legi la aŭtorojn, ekz-e en la [Belartaj Rikoltoj](#) aŭ en aliaj eldonaĵoj: <https://katalogo.uea.org>

Novaj libroj lanĉitaj dum UK

■ **Unu animo homa** - temas pri la kompleta verkaro de Marjorie Boulton, kun 1212 paĝoj (en 2 volumoj!)

■ W. Shakespeare: **Koriolano**. Edmund Grimley Evans trovis nefinitan tradukon

de M. Boulton kaj Humphrey Tonkin poste ĝin kompletigis kaj plibonigis.

■ Esperanto-versio de la komikso: **"Doktoro Esperanto kaj la lingvo de espero"**.

■ Hju Rid - **Kuprokranio/Silverskull**. (tradukinto István Ertl) - Pri la eta talpo, kiu volis scii kiu faris tion sur lian kapon. Temas pri la daŭrigo (dua parto) de la libro "La Tago de Kiborgigo".

■ **Granda Esperanta-Slovaka Vortaro / Vel'ký esperantsko-slovenský slovník**. Bazita sur la Esperanta-ĉeĥa vortaro de M. Malovec. Redaktoro: Stanislav Košecký. Aŭtoroj: Miroslav Malovec, Ľubomír Fajth kaj kol.

■ **Scienco kaj tekniko kiel rimedoj por efektiviĝi daŭripovan evoluon**. La prelegkolekto de la faka evento Reta KAEST 2020 (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko). La kolekto enhavas kontribuojn en du kategorioj: ĉeftemaj (13 prelegoj) kaj alitemaj (15 prelegoj). Aldonaj 4 "fulmprelegoj".

■ **Detala Gramatiko de Esperanto**. Se "PMEG" estas tro p(r)eza, por vi, tiu ĉi nova gramatiko estas (preskaŭ) same detala kaj utila. Temas pri jam tria, plibonigita eldono. Aŭtoro: Bertilo Wennergren.

Laŭ kongresa kuriero La Taŭra Voĉo



foto Milan Kolka

DIPLOMOJ PRI ELSTARA AGADO

(aljuĝitaj en Torino)

1) Andrea Turrisi kaj Esteban Emilio Mosonyi (Venezuelo) pro ilia longtempa agado kiel motoroj de la Esperanto-movado en Venezuelo ekde la sepdekaj jaroj kaj kiel fondintoj de Venezuela E-Asocio. Turrisi, vigla movadano, longtempa redaktoro de la revuo “Venezuela Stelo”, nuntempe loĝas proksime al Torino. Mosonyi, emerita profesoro de antropologio kaj lingvistiko en la Universitato Centra de Venezuelo, spertulo pri indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj, daŭre aktivas pri la rajtoj de la originaj popoloj de Ameriko. Li aŭtoras gravan verkon pri dek el la indiĝenaj lingvoj de Venezuelo kaj kuntradukis “Eta Selektajo de Verkoj de Bolivar”.

2) Espoir Ngoma Kasati (D. R. Kongo) pro la vasta instruagado de Esperanto en Afriko, surloke kaj rete, aparte en lernejoj de Uviro (D. R. Kongo) kaj en Tieso (Senegalo), okaze de la preparoj por la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, kaj pro la kontribuoj por starigo de junularaj organizoj kaj en Orienta Afriko kaj en Senegalo.

3) Francis Hult (Usono) pro lia agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN) kiel reprezentanto de UEA kaj kiel prezidanto de la novkreita Komitato pri Lingvoj kadre de la Konferenco de Ne-Registaraj Organizaĵoj en Konsulta Rilato kun UN (CoNGO), organizinte interalie gravan kunsidon pri multlingveco en UN, en kiu estis egale uzataj la ses UN-lingvoj kaj Esperanto.

4) Mana Brinson Namutema (DR Kongo) pro la organizado de la movado en regiono malstabila pro milito, pro partoprenigado de junuloj en afrikaj E-eventoj (aparte pri dekoj da junuloj al la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto en Burundoka, Burundo) kaj pro la konstruo kaj tenado de Esperanto-domo por akcepto kaj edukado de infanoj, inkluzive kun enplekto de neesperantistoj, asistado, alfabetigo kaj instruado de Esperanto.

5) Manuela Burghilea (Rumanio) pro la valora volontulado ĉe Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), pro la agado kiel motoro en diversaj aktivaĵoj de TEJO mem kaj pro la laboro kiel unu el la ĉefaj agantoj ĉe Tutmondaj Voĉoj (*Global Voices* en Esperanto), subtene al la aperigo de gazetaraj artikoloj serve al diversaj lingvo-grupoj, aparte al indiĝenoj, minoritatoj kaj enmigrintoj.

6) Nisinaga Atusi (Japanio) pro la elstara agado kiel prezidanto de la Komisiono pri Azia kaj Oceanio Esperanto-Movado (KAOEM) kaj kiel vicprezidanto de Japana Esperanto-Instituto, gvidante en la komisiono 14 landajn reprezentantojn kaj respondante pri sukcesa okazigo de la 10-a Azia-Ociana Kongreso en Busano (Koreio).

7) Pascal Dubourg Glatigny (Germanio) pro la ampleksa agado en la Komisiono pri Financo de UEA, pro la esencaj kontribuoj al la efektivigo de la konservo de la Arkivo de UEA ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj de la Biblioteko Hector Hodler ĉe la Pola Nacia Biblioteko kaj pro la akademia agado pri Esperanto, interalie pro la kunorganizado de multlingvaj renkontiĝoj kaj seminarioj.

Lastatempe Glatigny verkis la antaŭparolon por la romano *La horo 25*, publikigita en 2022 en la serio Oriento-Okcidento de UEA.

8) Aŭstralia E-Asocio (Aŭstralio) pro la longdaŭra okazigo de somerkursaroj kun partoprenantoj kaj gvidantoj el diversaj landoj kaj kontinentoj kaj pro la daŭra serio de konstantaj retprelegoj dum kaj post la pandemio.

DIPLOMOJ PRI ELSTARA ARTA AGADO

(*aljuĝitaj en Torino*)

1) Miguel Fernández Martín (Hispanio) pro la plurjara konsciencia prezidado de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj aliaj grandaj kontribuoj al la artoj en Esperanto, aparte pri poezio, tradukoj, muziko kaj komentarioj. Lia brila plej nova verko *Omaĝe al Lorca* enhavas ne nur tradukojn de poemoj de la plej konata hispana poeto de la dudeka jarcento, sed riĉajn notojn, klarigojn kaj komentariojn por gvidi la legantojn en formo ankoraŭ ne atingita en tia verko en aliaj lingvoj.

2) Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) (Hispanio) pro la plurjara sekretariado de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj grandaj kontribuoj al la artoj en Esperanto, aparte pri verkado, eldonado, tradukoj, filmado kaj muziko. Li pionire eldonis scienc-fikciajn seriojn kiel *Sferoj*, *Orbito nula* kaj *Future*, antaŭenigis en Esperanto la ĝenron mikronovelo, redaktas kaj publikigas artajn filmmaterialojn kaj lastatempe agadas por renovigo de muziko en Esperanto, per konsilado, intervjuoj, tradukoj de

kantoj kaj subteno al novaj talentoj.

3) François Randin (Svislando) pro la longtempa agado kiel filmisto en Esperantujo, kun produktado de pli ol 20 filmoj, kelkaj premitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA. Li starigis en Laŭzano (Svislando) la filmkompanion Nandir por Esperanto-filmoj. Inter liaj premiitaj filmoj estas: *La ega kesteto* kaj *La Verda Stelulo*.

4) Helga Plötner (Germanio) pro la konstanta sindediĉo al la pentrado de famaj esperantistoj kun ampleksa rigardo al la internacia komunumo kaj ĝia diverseco. Ŝi jam aperigis 5 librojn, nome la serion *Esperanto por mi*, en kiuj ŝi jam pentris po 16 esperantistoj por libro, entute produktinte 80 portretojn kun biografioj.

PREMIO DEGUĈI 2023

Doktorino RASOHARINAIVO Mioranantenaina, pli konata kiel Miora Raveloharison, naskiĝis la 20-an de aŭgusto 1980 en Antananarivo, la ĉefurbo de Madagaskaro. Ŝi estas lertigistino kaj nuntempa membro de la Afrika Komisiono de UEA, respondeca pri virina agado kaj kulturo. Ŝi kaj la edzo estas gepatroj, gepatroj de juna filo, Jonathan.

Kun Alexandrine Omba el D. R. Kongo ŝi fondis Esperantistan Virinan Asocion en Afriko (EVAA) kaj en 2018 organizis la 1-an Afrikan Kongreson por Virinoj (AKVo), kiu okazis en Madagaskaro. Ekde 2008 ŝi ankaŭ estas prezidantino de madagaskara sekcio de KELI. Lastatempe ŝi kunlaboras kun aliaj malagasaj esperantistoj por revigligi la landan asocion de UEA kaj ĉiujn sekciojn de aliaj Esperanto-organizoj en Madagaskaro.

Ekskurse al belaĵoj de Moravia Slovakio

En la tagoj 24 – 27 de aŭgusto ekskursis membroj de Esperanto-klubo Svitavy konatiĝi kun la belaĵoj de Moravia Slovakio. Loĝadon ni havis en pensiono en Staré Město ĉe Uherské Hradiště, kie en la ĝardeno troviĝis baseno je nia dispono kaj malsupre bela restoracio kun komfortaj sidlokoj por amika kunestado. La baseno estis tre uzata dum la varmega somera vetero post la tuttagaj vizitadoj de tiu bela angulo de nia patrujo.



Tuj en Staré Město ni tagmanĝis ĉe albordiĝejo de Baťa-kanalo, trarigardis novtempan preĝejon de Sankta Spirito, privatan ĝardenon Isabelia kun bonsaĵoj, Memorejon de Granda Moravio.

Interesa estis vizito de „Kovozoo“ (= metala zoo) tuj en najbareco, kie estas multaj produktitaj interesaĵoj ekde malgrandaj bestetoj ĝis blanka ŝarko, ĉio el metalaj rubaĵoj. Ni trarigardis ankaŭ muzeon de veteranaj aŭtomobiloj kaj survoje el la metala zoo eĉ metalan historian ŝipegon kun interesa belvida turo en formo de klasika lumturo - tial „Maják Šrotík“ (Lumturo Rubaĵulo). Viziton meritas ankaŭ Arkeoskanseno kun belvida turo en Modrá kaj Centro de Moravi-Slovakiaj Tradicioj kaj ekspozicio „Živá voda“ (Viva Akvo). Ne malproksime estas konata pilgrimejo Velehrad, tra kiu ni promenis ankaŭ. Kelkaj sufiĉe marŝkapablaj turistoj eĉ direktis sin al belvedero Salaš. Neforgesebla es-

tis vespera ŝipado sur la rivero Moravo el Spytihněv ĝis Otrokovice kaj reen, akompanata de interesa klariga rakontado kaj ekkonado de homlaboraj rezultoj kaj naturfruktoj de suda Moravio.



Post vizito de flughaveno Kunovice, kie estas troveblaj famaj aviadiloj inkluzive de prezidenta specialo TU 154, kiu alflugis kun hokeistoj el Nagano kaj pri ĝia instalado ekzistas interesa filmo spektebla en la aviadilo mem, ni komencis promenon inter pentritaj vinkeloj en Petrov – Plže, ligita kun vintgustumado kaj rakontado pri tradicioj kaj kutimoj de Moravia Slovakio. Vasta kaj interesa estas skanseno en Strážnice tuj ĉe la albordiĝejo, kie ni haltis survoje el la vinkeloj. Vizitinda estis ankaŭ refreŝiga kaj amuztempa ripozejo „Slovácký dvůr“ (Slovakia Korto) en Ostrožská Nová Ves kun belvidejo, de kiu eblas gliti malsupren per tobogano. Ankaŭ revenante ni ekkonis amason da belaj lokoj. Tuj post Modrá ĉe belvidejo Modrá II ni ĝuis panoramon de la ĉirkaŭaĵo kun maturiĝantaj vinberoj, frandis en ĉokoladejo de la kastelo Buchlovice, kiu indas esti vizitita same kiel burgo Buchlov. Jam nun ni cerbumas, kiun regionon ni vizitos venontjare.

Miroslav Sýkora

Esperanto super abismo

La 5-an de la aŭgusto 2023 esperantistoj estis invititaj al amika renkontiĝo, kiu okazis en la urbo Hranice kaj ĉirkaŭaĵo. La ĉefa celo estis la fama Abismo de Hranice. La rendezuo estis je la 11-a horo en la stacidomo de Teplice nad Bečvou, kies parto estas posedaĵo de la urbo Hranice. Tiu parto de la stacidomo funkcias kiel turisma informcentro kaj muzeo dediĉita al la abismo. En la informcentro eblas, pere de "3-dimensiaj" okulvitroj, provi kvazaŭ ni estus en la abismo: tre miriga sperto. Plie, ni povis spekti filmon, kie ni vidis kiel laboras la speleogoj, kiam ili esploras la abismon. Poste ni piediris ĝis la abismo, por ke ni povu vidi ĝin desupre.



De ĉi tie ni iris piede al la urbo Hranice, kie ni renkontiĝis en restoracio „U Kramplů“ kun dua grupo de esperantistoj, kiuj ĉi tie jam atendis nin. Tie ni babilis kaj kompreneble tagmanĝis kaj gustumis freŝan bieron. Kuraĝon iri al la abismo havis 8 personoj, do la restoracia grupo estis pli forta.



Dank' al familio Peyrouy el Francio estis renkontiĝo internacia. Ĉe la aranĝo entute partoprenis 22 personoj kaj ĝi estis preparita de Ĉeĥa Fervojista E-Asocio kaj Amikoj de Esperanto en Hranice. Ni dankas al Ivan Potiška, nia ĉefa organizanto.

L. Hakl

Tutslovakia Esperanto-Kongreso 2023

De la 23-a ĝis 25-a de junio 2023 realiĝis Tutslovakia Esperanto-Kongreso en Nová Dubnica, kie nun troviĝas la centro de Esperanto en Slovakio kaj estas preparata biblioteko kaj arkivo portanta la nomon de Ján Vajs. La kongreso mem okazis en Dynamik, negranda hotelo, kiu por la tri tagoj apartenis al esperantistoj. En la unua etaĝo estis ne nur loĝoĉambroj, sed ankaŭ manĝejo kaj saloneto por prelegoj, ĉirkaŭ la muroj staris tabloj kun libroservo. En startrinkejo inter la manĝejo kaj saloneto eblis aĉeti vinon, limonadon, kafon. Kolektiĝis ĉirkaŭ kvindek personoj, multaj el Ĉeĥio, kiuj aŭskultis prelegojn, vizitis ankaŭ domon, kie troviĝas sidejo E@I, kaj alian domon kun la menciita biblioteko kaj arkivo.



Vendrede post enloĝigo la unua programero estis vizito de la sidejo de E@I en la unua etaĝo super la memservejo Koruna en la strato Trenčianská, kie jam atendis s-ano Stanislav Košecký. Kaj ankaŭ s-ano Zamenhof, kies vivgranda bildo kontraŭ la pordo invitas ĉiujn vizitantojn. La ĉambrego estas plena de bretaroj kun libroj, tabloj kun komputilojn kaj neelpakitaj skatoloj, ĉar la sidejo estas ankoraŭ preparata.

La kongreson malfermis video-saluto de la UEA-prezidanto Duncan Chartes speciale filmita por SKEF.



Sekvis posttagmezo de prelegoj: *Galaksioj – de la pra-eksplodo ĝis hodiaŭ* (C. Divoy), *Pri Jozefina Marečková* (M. Pilková), *Kiel la Eŭropa unio subtenis Vikipedion?* (M. „KuboF“ Matúšov), *Skize: slovaka E-movado en la jaroj 1918-1939* (M. Pilková), *Kiel protekti nian Esperanto-heredaĵon* (J. Altior, kiu venis kun sia 15-jara filo Damian, prelegis unuafoje esperantlingve, legante sian tekston).

Post vespermanĝo oni daŭrigis la prelegojn: *La plej novaj eldonaĵoj de ESPERO* (P. Baláž), *La plej novaj eldonaĵoj de KAVA-PECH* (L. Chaloupková), *Filmprezento: „Čaj a láska“ (Teo kaj amo)* (P. Kaščák) kaj *Vingustumado (vino&babelado), kunkantado* (M. Minichová) kaj konkurso en la ludo Vortoj (<https://vortoj.net/cs/>).

La sabata programo komenciĝis per raportoj de kluboj pri la agado (ankaŭ Milan Kolka informis pri agado en Brno, ĉefe pri retaj renkontiĝoj, al kiuj povas veni iu ajn, kiu havas aliron al interreto). Kelkaj meritplenaj SKEF-anoj ricevis diplomojn.

Sekvis balotoj, kiujn povis kompreneble partopreni nur membroj de SKEF; elektitaj estis: Magdaléna Feifířová, Peter Baláž, Pavol Petrík kaj Michal Matúřov (konata sub pseŭdonomo Kubof Hromoslav). Peter Baláž prezentis planojn de SKEF por la jaroj 2023-2026.



La plej solena momento de la kongreso okazis antaŭ E-arkivo kaj biblioteko de Ján Vajs, al kiu ĉiuj iris piede (strato L. Štúra, maldekstre en la sama domo estas gastejo).



Antaŭ la enirejo jam atendis reprezentanto de la magistrato, kiu prezentis saluton de la urbestro, kaj kantistino M. Źiarna, kiu prilaboras biografion de alia grava slovaka esperantisto Ján Vlař'an Dolinský,

kantis kelkajn liajn kantojn (Dolinský estis ankaŭ grava komponisto, dum socialismo eĉ ricevis titolon de merit-plena artisto). Kiam estis senvualigita memortabulo de Ján Vajs, la kongresanoj povis eniri. Ankaŭ ĉi tiuj spacoj estas nur duonpretaj, tial surplanke staris multaj skatoloj kun libroj kaj aliaj materialoj, ĉe la muroj estis duonplenaj bretaroj atendantaj librojn.



La sabata posttagmezo estis dediĉita al vizito de la urbo Trenĉín kaj de ĝia kastelo, kiu kiel mezepoka fortikaĵo gardis ŝtatlimojn. Estis sufiĉe da aŭtomobiloj por transporti ĉiujn interesatojn. De la kastelo estis videbla ankaŭ bela panoramo de la tuta urbo.



Post vespermanĝo daŭris la prelegoj. Stanislav Košecký prezentis novan vortaron de Ľubomír Fajth, Esperantan-slovakon, kiu estas traduko de la E-ĉeĥa vortaro de M. Malovec. Tiu poste skizis la historion de la vortaro. M. Matúšov prezentis revolucion en mastrumado de membro-bazo, M. Žiarna prelegis pri Ján Valaš'an Dolinský. Por la amika vespero ĉe vinglasoj koncertis Eva-bando.



Ankaŭ la dimanĉa antaŭtagmezo estis prelega. Stano Košecký klarigis la evoluon de la Esperanto-gramatiko, precipe ekde Plena Analiza Gramatiko (PAG) de Kalocsay-Waringhien ĝis Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG) de B. Wennengren. La planita prelego pri la Viena muzeo ne okazis, ĉar s-ro B. Tuidler malsaniĝis kaj ne alveturis. P. Baláž prezentis planojn de E@I kaj M. Matúšov programon, per kiu via telefono povas kun vi paroli esperantlingve. Tre interesa estis bildoprelego pri Tanzania ubo Aruŝo, kie okazos venontjara UK (estos "vintro", do modera vetero). M. Kolka propagandis postdiplomajn studojn en Poznano kaj Instruistan trejnadon. Lasta prelego priskribis impresojn de R. Androvska pri Poliglota Renkontiĝo 2023.

Svitavy en tutmonda aranĝo



Unuiĝintaj Nacioj proklamis la 21-an de majo Internacia Tago de Teo, ĉar teo estas la plej grava trinkaĵo en la mondo kaj kreis gravan teo-kulturon. Ĉi-jare en majo la Internacia Tago de Teo estis festata en la uzbeka urbo Samarkand kunlabore kun ĉinaj esperantistoj. En 36 lingvoj (inter ili ankaŭ la ĉeĥa kaj slovaka) estis prezentitaj video-salutoj kun frazo „Ĉu vi hodiaŭ trinkis teon?“ La ĉeĥan registris klubanoj de Esperanto-amikoj el Svitavy. Jam la kvinan fojon ili partoprenas, antaŭ kvin jaroj Svitavy ricevis diplomon Urbo de Teo kaj apartenis al tri eŭropaj urboj kun tiu diplomo (la ceteraj urboj estas el aliaj mondopartoj). La klubo registris la salutparolon ne nur ĉeĥe, sed ankaŭ ĉine, kvankam ilia ĉina membrino Li Huang nun estas hejme en Ĉinio, tamen ŝi helpis eĉ distance.

En Jutubo vi povas aŭskulti la salutvideojn en la 36 lingvoj:

www.youtube.com/watch?v=UuIOn-yJLqo

Libuše Dvořáková

Libroj 2023

Ĉiujmonate aperas 4-5 novaj libroj en Esperantujo

Lando kiu vekigis. Rakontoj el Ukrainio. Kalle Kniivilä. Prozo originala / Politiko. Mondial. Novjorko. 2023. 169 paĝoj.

Vivo de Galilei. Bertolt Brecht. Tradukis A. den Haan, W. Jansen. Teatraĵoj. Lorno. Rotterdam. 2023. 147 paĝoj.

Galopu, ĉevaletio! / Bjagaj konĉe! Historioj kun vostaj herooj / Istorii s opaŝati geroi. Elena Popova. Miksitaj literaturo. Matador 74. Dobriĉ. 2023. 130 paĝoj. Rakontetoj kaj versaĵetoj taŭgaj por infanoj kaj komencantoj.

Plena Vortaro Germana-Esperanto en tri volumoj / Vollständiges Wörterbuch Deutsch-Esperanto in drei Bänden. Erich-Dieter Krause. Lerniloj, vortaroj / germana. Mondial. Novjorko. 2023. Kun pli ol 250 000 leksikaj unuoj, tiu ĉi estas la plej ampleksa nacilingva-Esperanta vortaro.

Konstruado-kajero 2023. Jara revuo de TAKE. Red. Pierre Grollemund. Scienco kaj tekniko / konstruado. TAKE. Wintzenheim. 2023. 76 paĝoj.

Noveloj kaj rakontoj. Henryk Sienkiewicz. Tradukis div. Prozo tradukita / rakontoj. Ars libri. Lublin. 2023. 852 paĝoj.

Ifigenio en Taŭrido. Dramo en kvin aktoj. J.W. von Goethe. Tradukis L.L. Zamenhof. Teatraĵoj. Fonto. Chapecó. 2023. 117 paĝoj.

Mi vivas en la mondo malperfekta. Mikaelo Bronŝtejn. Poezio originala. Ars Libri. Lublin. 2023. 509 paĝoj.

Reĝo Ubuo. Alfred Jarry. Tradukis Th. Larger, Th. Tailhades. Teatraĵoj. Espéranto-France. Paris. 2023. 109 paĝoj.

Pensoj pri la Esenco. Tetjana Lohvinovska. Tradukis O.A. Fischer. Filozofio. MSD. Brno. 2023. 80 paĝoj.

Beletra Almanako 46. (Februaro 2023). Red. P. Daŝgupto, I. Ertl, J.L. Jacobsen, S. Moinhos, N. Ruggiero, A. Stecay. Miksitaj literaturo. Mondial. Novjorko. 2023. 139 paĝoj. Prozo kaj poezio (originalaj kaj tradukitaj), teatro, artikoloj, eseoj, recenzoj.

Sinjorino en ruĝo sur griza fono. Miguel Delibes. Tradukis A. Valén. Prozo tradukita / romanoj. Mondial. Novjorko. 2023. 90 paĝoj.

Mia vivo kun Esperanto. Petr Chrdle. Biografiaj / Chrdle. KAVA-PECH. Dobřichovice. 2023. 236 paĝoj.

Dio preterpasas. Shoghi Effendi. Tradukis Bahaa E-Ligo. Religio. Bahaa E-Ligo / Mazloum Media. Offenbach. 2023. 466 paĝoj.

Ruta Tannenbaum. Miljenko Jergović. Tradukis T. Chmielik, J. Pleadin. Prozo tradukita / romanoj. Ars Libri / DEC. Lublin / Ĝurdevac. 2023. 344 paĝoj.

Falaflo en maco. Sten Johansson. Prozo originala. Mondial. Novjorko. 2023. 177 paĝoj. Originala romano kun tikla temo: rilatoj inter jud- kaj arabdevenaj civitanoj en Svedio.

Aspazio. Tragedio en kvin aktoj. Aleksander Svjentoŝovskij. Tradukis L. Zamenhof. Teatraĵoj. Fonto. Chapecó. 2023. 226 paĝoj.

La Granda Esperanta-litova vortaro, / Didysis esperanto-lietuvių kalbų žodynas. Petras Čeliaskas. Lerniloj, vortaroj / litova. Pasaulio lietuvių centras. Kaunas. 2023. 807 paĝoj.

Semo de matenruĝoj. Miguel Fernández. Poezio originala. Mondial. Novjorko. 2023. 153 paĝoj.

Jarsezonoj kaj festotagoj per okuloj de bestoj. Eva Buttová. Tradukis P. Petrik. Simplaj legaĵoj kaj infanlibroj. KAVA-PECH. Dobřichovice. 2023. 56 paĝoj.

Bluaj neĝoj. Piotr Bednarski. Tradukis E. Grochowska. Prozo tradukita / romanoj. KAVA-PECH. Dobřichovice. 2023. 119 paĝoj.

Esperantologio / Esperanto Studies. Nova Serio / New Series 4 (12). Red. Guilherme Fians, Klaus Schubert. Eseoj. CED / Mondial. Rotterdam / New York. 2023. 135 paĝoj.

Sadako volas vivi! Karl Bruckner Tradukis J. Duda. Prozo tradukita / romanoj. KAVA-PECH. Dobřichovice. 2023. 173 paĝoj.

Ekster la limo. Apokrifoj esperantigitaj de Gerrit Berveling. Tradukis G. Berveling. Religio. KAVA-PECH. Dobřichovice. 2023. 138 paĝoj.

Leoneto, Museto kaj aliaj. Vika Pipina. Tradukis S.V. Smetanina. Simplaj legaĵoj kaj infanlibroj. s.e. Moskva. 2023 (3a eld.). 28 paĝoj.

La Kanada verkaro, Red. W. du Temple. Antologioj. FriesenPress. Altona. 2023 (rev. eld.). 441 paĝoj.

Ĉantorio 2023

Ĉi-foje (la 20-an de junio) venis almenaŭ 20 Esperanto-parolantoj, verŝajne danke al la sunplena vetero kaj anonco publikita sufiĉe frue de samideano Andreo en [Eventa Servo](#). Kelkaj el ni venis al la pinto perpiede el Nýdek en Ĉeĥio, kelkaj de alia montkabano ĉe Sošovo apud urbeto Wisła, kelkaj per biciklo (gratulon!) kaj aliaj per telfero el pola urbeto Ustroń Polana.




Ĉu vi konsentas kun mi, ke estis plezuro spiri freŝan montaran aeron kaj ke verdeco de plantoj kaj kanto de birdoj ĝojigis okulojn kaj orelojn? Estis varmege kaj malvarma biero aŭ alia trinkaĵo bongustis. Ni kantis kune [la himnon de Ĉantorio](#) kaj [aliajn kantojn](#), gustumis lokan manĝon, babilis interalie pri mielo (kelkaj esperantistoj okupiĝas pri abelbredado kaj multaj ŝatas gustumi dolĉajn abelproduktojn), pri la jubilea 550-a naskiĝdatreveno de [Koperniko kaj itinero de tiu astronomo](#), kaj pri baldaŭaj Esperanto-eventoj. Samideano Zdeněk montris fotoalbumon kaj disdonis bildkarton pri sia urbo Havířov, la plej juna urbo de Ĉeĥa Respubliko, ĉirkaŭata de arbaro, apud la rivero Lučina, kie okazas [internacia belarta konkurso](#) por

infanoj kaj junularo, lastempe popularigita ankaŭ pere de Esperanto. Esperantistino Libuše invitis al festado de jubilea datreveno de [Esperanto-muzeo en Svitavy](#) ĉi-septembre.



Ni pridiskutis eblecon fari denove tutsemajnfanan renkontiĝon, same kiel antaŭ kelkaj jaroj, kiam grupo de geesperantistoj unue vizitis la karbo-minejon en Zabrze kaj faman radio-elsendturon en Gliwice je pola flanko kaj venontan tagon venis al Ĉantorio, aŭ simile kiel antaŭ pliaj jaroj, kiam sur la pinto renkontiĝis grupo de junaj esperantistoj dum la tuta semajfino. Samideano Jaroslav kaj esperantistino Monika proponis venontjare unue renkontiĝon en Moravio, ĉar tie estas pluraj vizitindaj lokoj, kaj poste daŭrigon al la Ĉantorio-monto dimanĉe, kio povus okazi ekzemple [laŭ tiu vojo](#) (Bartošovice - Studénka - Ostrava - Vítkovice - Třinec - Ustroń Polana) aŭ alternative laŭ [alia vojo](#) (trajnhaltejo Čierne pri Čadci ĉe la fervoja linio Zwardoň - Čadca, poste Jaworzynka Trójstyk-Hrčava Trojmezí - Jablunkov - Bystřice - Ĉantorio) aŭ [ankoraŭ alia vojo](#).

ĉe la pola flanko: Jaworzynka Trójstyk-Hrčava Trojmezí - Istebna - Wisła - Ustroń Polana - Ĉantorio). Se okazos plurtaga renkontiĝo (semajnfina) anstataŭ nur kelkhora, do verŝajne povos partopreni ankaŭ samideanoj el malpli proksimaj loĝlokoj.



Sciindas, ke post kelkaj jaroj estos centjara jubileo. La 8-an de majo 1927 sur la monto Ĉantorio en Silezia Beskido okazis la unua renkontiĝo de esperantistoj, en kiu partoprenis entuziasmoj de la internacia lingvo el Ĉeĥio, Slovakio, Hungario kaj Pollando, entute 111 homoj. La ĉiujara kunveno okazadis ĝis 1938.



Post la milito, kvankam Ĉantorio estis dividita per limo, esperantistoj ne hezitis

subteni la tradicion. Garditaj de limgardistoj dum multaj jaroj ili renkontiĝadis nur vidante unu la alian ambaŭflanke, kriante por saluti unu la alian, ne povante eĉ amike manpremi. Tiu sitaŭcio daŭris ĝis kiam Pollando, Slovakio kaj Ĉeĥio aliĝis al la strukturoj de Eŭropa Unio. Tiam la landlimo ŝajnis ĉesi ekzisti. La soldatoj malaperis, la baroj estas kunvolvitaj, kaj nun oni povas facile iri el unu flanko al la alia kaj ĝui transliman renkontiĝon. Jen plia informo pri [historio de la renkontiĝoj](#).



Ĝis la revido venontfoje sur la monto, okaze de kongresoj, ripozado kun la lingvo internacia aŭ vizitante unu la alian!

Adam Wilkus



La 14-a Internacia Himalaja Renkontiĝo

okazonta ekde la **26-a februaro ĝis la 8-a de Marto, 2024**. Ĉi-foje, ni celas gvidi la partoprenantojn al mondfama turisma loko de Nepalo nomiĝanta Mardi Himal. Ni okazigas diversajn esperantajn eventojn, kiuj stimulas nian lokan movadon. En la **14a Himalaja Renkontiĝo**, unu el ili, ĉiuj aĝgrupoj povas facile partopreni, kaj samtempe kuraĝigi nepalajn esperantistojn.

Bharat Kumar Ghimire
Ĝenerala Sekretario

Nepala Esperanto-Asocio

Retadreso: nespal1990@gmail.com

Esperanto-literaturo Superkatalogo

En la retejo de Esperanto-klubo Brno: <http://esperantobrna.cz/malnova/publikac/c/publikac.html> vi trovos supervidon ne nur de Esperanto-publikaĵoj eldonitaj en nia teritorio, sed nove ankaŭ ĉiujn tutmonde ekde 1887 ĝis 2023. Se vi elŝutos Superkatalogon, vi vidos, kiel nia literaturo kreskis kaj kreskas de jaro al jaro. Ĉiujare aperas 100 ĝis 200 libroj, do 2 ĝis 4 ĉiusemajne. Detalan priskribon vi trovos ĉe la [viena muzeo](#) kaj mendeblon ĉe [Libroservo de UEA](#) kaj ĉe unuopaj eldonejoj.

Urba Biblioteko Benešov


Lunde la 23-an de oktobro 2023 Vlasta Stará kaj Leonarda Chaloupková diskutos pri Esperanto kun legantoj.

Donaco de IKUE

La komitato de la katolika sekcio (IKUE) decidis disponigi al ĈEA 25 mil kronojn. Temas pri kolektitaj monrestaĵoj el organizitaj tri IKUE-kongresoj en nia lando kaj el 12 Katolikaj E-tendaroj okazintaj en Sebranice, kiujn siatempe aranĝis la sekcio. Ĉar la mono ne plu estas bezonata por la sekcio, kaj la progresanta inflacio iom-post-iome senvalorigas ĝin, do la komitato konsentis disponigi la monsumon al ĈEA (laŭ propono de sia prezidanto). Dum pli ol tridekjara ekzistado de la sekcio, ĉio estis farita senpage, senprofite.

ĈEA-komitato esprimas grandan dankon al niaj katolikoj.

Novaj diplomo kaj libro de Max Kašparů



Interlingvistiko ĉe Masaryk-universitato

Ĉe Masaryk-universitato en Brno ekzistas kurso pri [interlingvistiko](#), kiu dividas la lingvojn je naturaj kaj konstruitaj. La konstruitaj povas helpi al studentoj de [lingvoscienco](#) kompreni pli bone la lingvistikajn konceptojn. Se ili estas destinitaj por internacia komunikado, oni nomas ilin interlingvoj (kontraste al ekz. programlingvoj).

KER-Ekzameno, niveloj C1 kaj C2

La ekzamenoj nomiĝas KER, ĉar ili estas konstruitaj laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj. Kun UEA ilin organizas Edukado.net. Por kuraĝigi vin, ni priskribos, kiamaniere ili estas plenumataj.

Ĝis nun la KER-ekzamenon je nivelo C1 trapasis 9 homoj el Ĉeĥio, tri el ili dum la ĉi-jara torina sesio (Lenka Doškářová, Josef Kalčík kaj Milan Kolka), je nivelo C2, kiu ĉi-jare okazis unuan fojon, du homoj (Matyáš Elicer kaj Miroslav Malovec). Edukado.net ilin metis en sian Fier-liston.

<https://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj?v=CZ>

Kaj kiam vi trapasos la KER-ekzamenon?



La nivelo C1 estas (laŭ Vikipedio): “Li kapablas kompreni larĝan gamon da postulemaj kaj longaj tekstoj, rekonas la implicitajn signifojn. Li kapablas flue kaj spontane esprimi sin, sen ofte serĉi esprimojn. Li kapablas uzi la lingvon flekse kaj efike por sociaj, porstudaj kaj profesiaj celoj. Li kapablas verki klaran, bone konstruitan, detalan tekston ankaŭ pri pli kompleksaj temoj, kaj dume kun

certeco aplikas la tekstoredaktajn ŝablonojn, konjunkciojn, tekstokunligajn elementojn. Temas pri strikte lingvaj konoj.”

La ekzameno havas du partojn – skriban kaj parolan. Eblas trapasi ambaŭ partojn samtempe, tiam la ekzameno estas nomata kompleksa. Se vi aliĝos al kompleksa ekzameno, sed sukcesos nur en unu parto, tiam vi ricevos atestilon nur pri tiu parto, kie vi sukcesis.

Skriba ekzameno taksas tri kapablojn – bone koni gramatikon, kompreni tekston kaj skribi. La ekzameno daŭras kvar horojn. En la unua parto vi solvos lingvajn taskojn. Ne temas pri akuzativo, sed pri pli malfacilaj lingvaĵoj. Unu ekzerco estis pri ĝusta uzo de **ig** kaj **iĝ**. En la dua tasko oni devis elekti taŭgan radikon por frazo kaj tria estis pri ĝusta uzo de reflektivaj pronomoj (**si**, **sia**). Post la lingvaj ekzercoj estis du tekstoj kun demandoj. Oni devis elekti ĝustan kompletigon de la frazo aŭ trovi en la teksto malofte uzatan vorton laŭ priskribo. Por la unua parto de la ekzameno ni havis du horojn kaj ne rajtis uzi vortaron.

En la dua parto de la skriba ekzameno ni havis du taskojn. La unua estis skribi leteron. Ni povis elekti el du temoj – persvadi amikinon partopreni kongreson en Aruŝa aŭ pri instruista trejnado en Poznań. Por la dua tasko ni legis mallongan gazetnovaĵon kaj ni devis skribi komenton. Ambaŭ tekstoj devis esti nur unu paĝon longaj (200 vortoj). Disponita tempo por tiu ĉi parto estis du horoj kaj ni rajtis uzi unulingvan vortaron (PIV).

Parola ekzameno havas parolan kaj aŭskultan partojn. Dum la parola parto la ekzamenanto libere parolas kun ekzamenantojn. Poste oni hazarde elektos du bildetojn. La kandidato elektos unu el ili kaj devas priskribi la bildon al la ekzamenanto kvazaŭ li estus blinda. Ne sufiĉas diri “tie estas X”, sed priskribi ĝin kaj ankaŭ diri, kion la bildo eble signifas. Mi priskribis foton de dezerto kun homo en la angulo. Tria parto estas situacia ludo. Vi hazarde elektos temon kaj vi devas interreagi kun la ekzamenanto. Mia tasko estis paroli kun “filo”, kiu volas novan ludaparaton. La lasta parto de parola ekzameno similas al la lasta tasko de la skriba ekzameno. Ni devis laŭtlegi tekston kaj diri opinion pri ĝi.

La aŭdkomprena parto estis, almenaŭ laŭ mi, la malpli facila. Ni aŭdis du sonregistraĵojn, kie estis legata iu teksto. Ambaŭ registraĵojn ni aŭdis dufoje. Ambaŭ tekstoj estis tre informriĉaj, tial estis preskaŭ neeble ĉiujn informojn memori. Por la unua teksto ni devis skribi respondi al demandoj, kiuj rilatis al la teksto. Por la dua teksto ni devis elekti ĝustajn respondojn.

Por ĉiuj taskoj oni ricevas poentojn. Estas minimumo por taskoj de iu tipo kaj minimumo por ĉiu parto, kiu estas pli alta ol sumo de po taskaj minimumoj.

La nivelo C2: *„Li facile komprenas preskaŭ ĉiun aŭdatan aŭ legatan tekston. Li kapablas resumi informojn venintajn el diversaj parolataj aŭ skribataj fontoj, kapablas kohere reprodukti argumentojn kaj raportojn. Li kapablas tre flue kaj precize esprimi sin, distingi inter la plej etaj nuancoj de la signifoj, eĉ en la plej komplikaj situacioj.“*

Marde estis parola ekzameno. El pluraj temoj mi elektis migrantojn. Mi havis dudek minutojn por prepari publikan paroladon. Mi diris, ke migrantojn la loĝantoj perceptas iam pozitive, kiam ili venis labori kaj multaj firmaoj sen ili ne povus produkti, ĉar migrantoj akceptas eĉ laborojn, kiujn „hejmuloj“ rifuzas fari, sed iam negative, kiam ili venis nur ekspluati socialan sistemon de gastiganta lando. Poste mi prezentis kelkajn ekzemplojn el Ĉeĥio, ĉar nur dum la parolo mi rememoris tion aŭ alion, do iom kaose. Fine la ekzamenantoj kun mi iomete babilis pri la temo kaj invitis min al skriba ekzameno vendrede.

Vendrede mi ricevis kelkajn paperojn, kie estis presitaj temoj, demandoj, artikoloj, simple 8 taskoj.

1. Unue ni povis legi dek demandojn kaj poste dufoje aŭskulti el komputilo kvar alinaciajn parolantojn pri la pensia sistemo en ilia lando. Ĉiu parolis alisisteme, kaj ni devis fari aŭ ne fari krucon en tabelo kun kvar kolumnoj (kvar landoj) kaj dek linioj (dek demandoj), kiujn el la kvar landoj koncernas la demando (aserto). Ekz. ĉu la homoj emeritiĝas en la aĝo de 65 jaroj? Mi do devis memori, kiuj el la kvar parolantoj tion diris.

2. Viro en filmeto klarigis du voĉdonajn sistemojn kun multaj matematikaj formuloj, kalkuloj kaj grafikaĵoj, kiujn mi ne komprenis. Sed ŝajnis al mi, ke aŭ ĉiu voĉdonanto povas doni sian voĉon nur al unu kandidato (majoritata sistemo) aŭ ekz. kvar voĉojn al kandidato C, tri al A, du al D kaj unu al B (alia sistemo). Mia tasko estis klarigi avantaĝojn de tiu alia sistemo.

3. En teksto mankis frazo-partoj, vicigitaj post la teksto. Mi devis kompreni, al kiu frazo ili apartenas.

4. En teksto mankis partoj de vortoj kaj mi devis aldoni la saman kvanton da literoj kaj ricevi bonan signifon. Ekz. al arbaro kuris lep... (lep-oro). Al arbaro kuris leporo.

5. En teksto mankas vorto, post la teksto estas klarigo, kion la vorto aludas, kaj proponitaj kelkaj vortradikoj, el kiuj mi devis elekti la plej taŭgan, aldoni finaĵon, eventuale prefikson kaj sufikson. Ekz. Oni lin perfekte (ataki: *frap*, *bat*, *draŝ*). Oni lin perfekte tradraŝis.


6. Artikolo pri fizika-kemia priskribo de lumo kaj de nia okulo. La homa okulo kapablas distingi 7200 kolorojn, sed ili povas havi diversajn intensojn, tiam ni povas vidi eĉ milionojn da koloroj. Respondu, ĉu estas vero, ke la homa okulo kapablas distingi 7200 kolorojn?

7. Mi devis konvinki eldonan firmaon, kiu rifuzis eldoni miajn instruajn sonmaterialojn, ĉar similajn ĉiu povas elŝuti el la interreto, ke oni ankoraŭ pripensu la aferon kaj invitu min al diskuto. Mi skribis, ke estas diferenco, se komencanto aŭskultas kaose elŝutitajn sonmaterialojn, aŭ se sperta instruisto, kiu verkis akompanan lernolibron, proponas taŭgajn sonmaterialojn vicigitajn laŭ progresiga sistemo.

8. En la lasta tasko mi elektis sporton en nia respubliko. Mi skribis pri Sokol kaj Orel kiel pri populara sportado de nia publiko kaj pri kulmina sportado, kiu donis rezultojn kiel Zátopek, Čáslavská, Lendl, Raška kaj aliaj. Nia nuntempa junularo ne emas sporti kaj obeziĝas ĉe komputiloj. Mi devis uzi 400 vortojn.

Legu pli pri la ekzameno en

<https://edukado.net/ekzamenoj/ker>.



Por C2 estas elŝuteblaj instrukcioj kun ekzemploj, por ke la kandidatoj povu trejni kaj prepari sin. En Jutubo troveblas ankaŭ videoj pri KER-ekzamenoj.

Milan Kolka (pri C1)

Miroslav Malovec (pri C2)

KLUBA VIVO

Prostějov: La 13-an de julio ses niaj membroj partoprenis turniron en bovingo.



Brno:

Aŭtunaj programoj

6.9.: Someraj Esperanto-eventoj per Zoom

13.9. Paŝoj al plena posedo - Paŝo naŭa -

Horloĝo - malgranda miraklo – Josef

Vojáček, Klubejo Hybešova 65a, Brno

20.9. **KER ekzameno per niaj okuloj** – Milan

Kolka, rete per Skajpo

4.10. (provizore) **Spirita literaturo ĉe KAVA-**

PECH – Petr Chrdle, rete per Zoom, komuna

renkotiĝo kun klubo Glivice

18.10. **Kion ni legas** – Milan Kolka, rete per

Skajpo

Agado de UEA en 2022

laŭ estrara raporto

Membraro: En 2022 UEA havis 4 552 individuajn membrojn (IM), pli ol en 2021 (4424, +128). Tiuj IM-oj reprezentas 126 landojn aŭ teritoriojn: plej multe Germanion (395), Francion (337), Brazilon (290), Usonon (277) kaj Japanion (222). Daŭra problemo estas la falo de la abonanoj de la papera versio de *Esperanto* (entute -78 kompare kun 2021. Daŭre estas tendenco legi materialon nur rete. Iom malkreskis la kvanto de aligitaj membroj (AM): 8 509 (8 522 en 2021, -13), el kiuj 1 226 (1 224 en 2021, +2) estas junaj AM-oj (TEJO). Tiel la tuta membraro (IM+AM) de UEA en 2022 estis 13 063 personoj.

Informado: Laborgrupeto "zorgantoj pri informado", gvidata de Renato Corsetti, zorgis pri formala propono al Unesko por deklaro de la Internacia Tago de Esperanto (26-an de julio). Okaze de la Zamenhof-tago (15.12), UEA komunikis pri la Esperanto-vortoj aperantaj sur la oficialaj pilkoj Al Rihla kaj Al Hilm de la Futbala Mondpokalo 2022 kaj gratulis al Adidas kaj FIFA pro la elekto utiligi Esperanton.

Poliglota agado: UEA estis en 2022 ĉefsponsoro de la Poliglota Renkontiĝo, kaj la ĉesta, kaj la reta. En ambaŭ eventoj Esperanto estis vaste disvastigita...

Eksteraj rilatoj: Pluraj teamoj reprezentas UEA en pluraj oficejoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Strategia Laborplanado: 2022 anonciĝis kiel "Jaro de strategia planado".

Transdono de la Arkivo de UEA al la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: En la unua semestro de 2022 la Arkivo de UEA kaj neduoblaĵoj de la Biblioteko Hector Hodler, kiuj troviĝis en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo, estis transdonitaj al la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB) en Vieno.

Reta agado: UEA estas aŭspicianto kaj sponsoro de projektoj: Eventa Servo, Komputeko, Telegram, WordPress, Vikipedio, Vikidatumoj, Esperanto kaj Libera Scio.

Revuoj: *Esperanto*, inkluzive de la voĉlegitaj numeroj, aperis regule kaj akurate danke al diligenta laboro de Ŝevĉenko kaj Striganova kaj komisiito pri voĉlegado L. Obando. Pere de li UEA ankaŭ subtenis voĉlegadon de *Monato* por P. Peeraerts kaj LIBE. Aperis nur kvar numeroj de *Kontakto*. Informilo *EKO* (Esperiga Komunikilo): Stefan MacGill pretigis kaj sendis 72 numerojn dum 2022.

Scienca kaj faka agado: La unua post-pandemia Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj la rilata Scienca Kafejo (SK) okazis plene hibride kadre de la UK en Montrealo. Kafejo. Ĉiuj prelegoj estis registritaj kaj sekve montritaj kadre de la Virtuala Kongreso en novembro kaj jutubo.

Kultura agado: Jarkomence UEA honoris la ĉeĥan poetinon Eli Urbanova. Nova verko aldoniĝis al la Serio Oriento-Okcidento, sub la n-ro 61: *La Horo 25*, tradukita de Ionel Onet.

Věra Ludíková - 80

Verkistino kaj poetino Věra Ludíková, amikino de Esperanto, naskiĝis en Ústí nad Orlicí (16.6.1943), sed ekde la junaĝo ŝi vivas en Prago. Dum multaj jaroj ŝi laboris en pluraj eldonejoj kaj mem gvidis la eldonejon Chronos, en kiu ŝi krom la propraj verkoj eldonis ankaŭ ĉeĥlingvan libron de Jiří Karen "Ekspedicioj de Don Quijote en la profundojn de la homa animo". Ŝi estas membrino de Verkista Asocio, menciita en enciklopedioj KIU ESTAS KIU en ĈR 2002 kaj 2005. En aŭtoraj legadoj deklamis ŝiajn versojn Radovan Lukavský, Rudolf Pellar, Otakar Brousek, Milan Friedl, Alfréd Strejček kaj aliaj.



Ŝi verkis 28 librojn, en multaj el ili estas tradukoj al Esperanto (fare de Jaroslav Mráz, Jiří Patera kaj Miroslav Malovec) kaj kun helpo de esperantistoj ankaŭ al aliaj lingvoj (la nombro post + signifas, al kiom da lingvoj estis la originalo tradukita):

Váhy (1992, Pesiloj), **Oni netuší** (1993, Oni ne antaŭsentas), **Uslyšet duši** (1994, Ekaŭdi animon), **Uslyšet duši** – poemoj kaj tekstoj (1997), **Uslyšet duši** (1998), **Uslyšet duši 1+10** (1999), **Uslyšet duši**

1+16 (2000), **Kantáta** (2001, Kantato), **Je jaro 1+36** (2002, Estas printempo), **Pošli to dál** (2003, Sendu ĝin pluen), **Pošli to dál II** (2004), **Pošli to dál III** (2005), **Věk nadějí** – Posílej dál slova vyslyšivá (2006, La epoko de esperoj - sendu vortojn elaŭdeblajn), **Vzkříšení** – Služba lásky a oběti (2007, Resurekto - Servo de amo kaj ofero), **Kamkoli půjdeš** (2008, Kien ajn vi iros), **Eseje** (2009, Eseoj), **Pocta Boženě Němcové** (2010, Omaĝo al Božena Němcová), **Až jednou budu se s tebou loučit, Praho** (2011, Kiam mi foje estos adiaŭanta vin, Prago), **Otisky Vesmíru** (2012, Premsignoj de la Universo), **Malý básník** (2013, Malgranda poeto), **Vlna nad vlnu stoupá** (2014, Ondo super ondon ascendas), **Duše neumírá** (2015, La animo ne mortas), **Usedám nad bílou stránku** (2016, Mi eksidas super blanka paĝo), **Podobnost věčných témat** (2017, Simileco de eternaj temoj), **Kolik váží černá kapka** (2018, Kiom pezas nigra guto), **Je jaro 1+55** (2019, Estas printempo), **Kantáta 1+5** (2020), **Pastorela** (2021, Pastorelo).



Ŝi ricevis diplomon de Muzeo de rekordoj Pelhřimov, ĉar ŝi atingis rekordon aperiginte libron en 56 lingvoj.

Ĉi-jare la 26-an de majo 2023 en *Roza Herbejeto* de Újezdec apud Litomyšl dum *Muzika vespero* ŝi legis fragmentojn el siaj verkoj.

La 56a ILEI KONGRESO kaj La 79a JUNULARA KONGRESO

5-12.8.2023

Ambaŭ kongresoj komune okazis tuj post la Universala Kongreso en Torino.



De tie ni translokiĝis al Lignano Sabbiadoro ĉe la marbordo. Al ILEI aliĝis 157 geesperantistoj el 30 landoj kaj la IJK arigis 98 partoprenantojn el la tuta mondo. La kongresoj okazis en tre bela rezidejo *Bella Italia* ĉe pinarbaro kun zumentaj cikadoj. Tie ni loĝis en pluraj domoj dise en la arbaro kaj la programeroj okazis en kvin malsamaj lokoj je diversaj distancoj. La kongreso de ILEI estis hibrida, do aliaj esperantistoj kiuj ne havis eblecon ĉeesti pro manko de vizoj aŭ pro aliaj kaŭzoj, povis profiti de kelkaj programeroj rete de sia hejmo kaj samtempe eblis interveni aŭ prezenti siajn prelegojn. Tio estas granda avantaĝo kaj ŝparo de vojaĝkostoj por multaj samideanoj. Okazis multaj samtempaj programeroj kaj ni povis ĉeesti alterne iun ajn el ambaŭ kongresoj.

La ĉefa temo estis: "Intergeneracia kunlaboro pri edukado - instrui Esperanton en lernejoj". Ĝi estis plene reprezentata en la komuna programo.

Okaze de la inaŭguro, en la salono

Zamenhof, bonvenigis nin la jenaj reprezentantoj: Bruĉjo Kasini, Laura Brazzabeni, Alessandra Madella. Nome de la junularo salutis la nuna prezidanto de TEJO Alberto Stalin Garrido kaj la venonta prezidanto Tyron Surmon. La ĉefparoladon prezentis la prezidanto de UEA Duncan Charters. Oni legis diversajn salutojn de lokaj instancoj kaj de aliaj esperantistaj asocioj. Rete salutis la prezidanto de ILEI Ahmad Reza Mamduhi. Honoris nin la ĉeesto de la jam menciita prezidanto de UEA, de la sekretario Alex Kadar kaj de la ĝenerala direktoro Martin Schafer. Post la inaŭguro ni komune fotiĝis.



Dum la komunaj kongresoj okazis lingva festivalo, kursoj por komencantoj kaj por progresantoj, E-instruiloj en la bildkarta varbado, Trejnseminario - "Interkultura kompetento", Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneano en la mondo, Frazologio, Lernolibroj de E-o, La vojo al perfektigo, Lerneja agado inter Francio, Slovenio kaj Rusio, E-instruado en ĉinaj lernejoj, Kutimoj, Tra-

dicio kaj historio de Ukrainio, 60-jariĝo de la revuo Kontakto, La 30 oraj horoj, Flagoj de la prelegantoj, Vivi kaj viviĝi la lingvon, E-movado en Malagasio, Enkonduko al ĵurnalismo, Movadaj spertoj en Sudameriko, La projekto Verden en rilato kun instruado, Lud-forma origamia ateliero, Origamio kiel arto kaj scienco, Karaokeo, Duolingo, Birda migrado en la Amerikoj, Tanzanio kaj la UK en 2024. Estis pluraj prelegoj kaj sciigoj pri Litovio kaj Ukrainio, Ĉernobil, Homaj rajtoj en Pakistano, Instruado de la kroata lingvo, Instrui lingvon al pliaĝuloj. EkItalio-malkovro de la lando per vojaĝo inter la dudek regionoj de Italio kaj per rigardo de iliaj kulturoj kaj tradicioj. Interesa estis la prelego pri "Bonkvalita teo similas al belulino".

Krome okazis AMO (Aktivula MaturiĝO) seminario 102 kun titolo: "Interkulturo en Lernejoj". Estis diversaj diskutoj kaj interŝanĝoj pri instruaj spertoj. "Forumo por lernejoj instruistoj", "Scienca simpozieto". Eblis lerni Esperanton per afrikaj lingvoj kaj (inverse) afrikajn lingvojn per Esperanto. Bone funkciis ankaŭ libroservo.

Estis proponitaj allogaj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj: Udine, Marano Lagunare, Aquileia kaj Grado, Venecio kaj Murano, Triesto kaj Groto Giganta, San Vito al Tagliamento kaj San Daniele del Friuli.

Vesperaj programeroj konsistis el koncertoj de JoMo, Ĵomart kaj Nataŝa, Muzikalo I: "Petveturaj aventuroj", Muzikalo II: "La sorto gvidos vin". La gejunuloj okazigis "Movadan Foiron" kaj organizis frandan vesperon "Trinkomanĝa nokto" kun bongustaĵoj el la tuta mondo. Post ĉiuj vesperaj programeroj

ili dancis laŭ diversaj ritmoj kaj amuziĝis ĝis la tria horo en gufujo.

Eblis spekti filmojn, praktiki jogon, ĉigongon, aikidon, internaciajn popoldancojn, krei sian unuan retejon aŭ korean paperan ventumilon, aperis lud-forma origamia ateliero, kvizo, teatraĵo "Edukado por paco", Metropola tuteŭropa trajnreto, La Granda Homa Ĉeno - Ma-Ga filmo. Eblis sporti kaj ĝui la plaĝon. Gejunuloj prezentis la venontan IJK, kiu okazos en Litovio.

Okazis kunvenoj de BEMI, Komitato de ILEI, Asembleo de Itala Instituto de E-o, prelegoj pri famaj virinoj: Luisa Spagnoli, Antonietta Bernadoni, Verda Majo, Paola Masino, Tina Modotti, Maria Montessori, Flannery O' Connor, Marjorie Boulton, Marie Skłodowska-Curie, fratinoj Anna kaj Helene Michelaŭ - du artistinoj el Orienta Pruslando, Danica Bedekovic' Pobjednička kaj Antonija Jozic'.

Esperantistoj ĝenerale estas scivolemaj kaj ŝatas kontaktojn kun nekonataj homoj, tiel la kongresanoj havis la okazon konatiĝi kun homoj el aliaj kontinentoj de malsamaj kulturoj.




Vendrede vespere okazis la ferma ceremonio de ambaŭ eventoj. La aĝuloj kaj la gejunuloj bone interrilatis kaj ĝuis komunajn eventojn. Koran dankon al la organizantoj pro la bona sukceso!

Liba Gabalda

Ing. Miloš Bloudek, Karlovy Vary
Ing. Jiří Caletka, Praha
Mirko Eliášek, Rosice u Chrásti
Danuše Gattermayerová, Kroměříž
Věra Gavandová, Bludov
Luděk Holeček, Pěnčín
Karek Hromek, Křižanov
Jaroslava Humpová, Sviny
Jiří Kincl, Prostějov
Jaromír Kyzlink, Blansko
Ludvík Machát, Studenec
Mgr. Jana Melichárková, Ratíškovice
Marie Minářová, Svitavy
Jaroslav Nový, Ústí nad Labem
Čestmír Petráš, Štramberk
František Skoumal, Bludov
Marie Vrabcová, Jablonec nad Nisou
František Filip, Rasošky
Ing. Mária Pilková, Brno
Jitka Tyšerová, Praha

Al karaj jubileantoj ni deziras bonhumoron, feliĉon kaj sukceson en la vivo, firman sanon!

Jana Melichárková (1958)



Honora membrino de ĈEA, instruistino, prezidantino de pedagogia komisiono kaj iama prezidantino de ĈEA (2005-2011), kiu inaŭguris nian muzeon antaŭ 15 jaroj. Aŭtorino de duvoluma Esperanto-lernolibro por infanoj, kiu estis tradukita ankaŭ en la polan lingvon. Ŝi organizis aranĝon Adonido Ratíškovice kaj en 2005 ŝi skribis leteron al niaj politikistoj proponante Esperanton por la lernejoj (kelkaj almenaŭ ĝentile respondis).

Ni rememoras ...

Theodor Kilian (1894 - 1978)

Antaŭ 45 jaroj somere forpasis Theodor Kilian, unu el la plej gravaj esperantistoj nialandaj, honora membro de ĈEA. En Verda Stacio de Brno li gvidis plurajn radiokursojn, prezentis dudekon da prelegoj pri Ĉeĥoslovakio kaj tradukis Blankan Malsanon de Karel Čapek, kiu estis elsendata kiel radioludo unu jaron antaŭ okupacio de nia lando fare de nazioj. Li verkis lernolibrojn de Esperanto, kiuj aperis en pluraj eldonoj, kunfondis E-klubon Třebíč kaj Someran E-Tendaron en Lančov. Al liaj verkoj apartenas ankoraŭ broŝuro *Esperanto a jeho tvůrce* (Esperanto kaj ĝia kreinto, 1934) kaj traduko el Otakar Březina *Konstruado en altoj*. Por la tendaro li verkis broŝuretojn *ABC mezinárodního jazyka* (ABC de la internacia lingvo) kaj *808 nejpoužívanějších slovních kmenů* (808 plej uzataj vortradioj).



Josef Fousek (1881 - 1973)

Antaŭ 50 jaroj forpasis JUDr. Josef Fousek el Přelouč, honora membro de ĈEA, kiu kiel eksperto muzikologa kunlaboris kun Tomáš Pumpr pri liaj oper-tradukoj (Najado, Vendita Fianĉino). Li verkis eseon kiel traduki kantojn kaj mem plurajn esperantigis (ekz. Al malproksima amatino de Beethoven).



Zprávy svazového výboru

- Výbor se schází pravidelně každý měsíc, většinou virtuálně přes internet, při akcích i fyzicky.
- Svaz realizoval překlad stránek e-shopu LIBRISTO
- Výbor prodloužil smlouvu o muzeu s městem Svitavy
- Byla navázána spolupráce s Jiřím Altioem a Institutem renesance kulturního dědictví
- Výbor připravil svazovou konferenci v Prudké u Tišnova na 29.9. - 1.10.2023
- Výbor vyzval pamětníky hnutí, aby zaslali své vzpomínky
- Výbor řeší uchovávání elektronických dokumentů na svazovém úložišti NAS a Google-disku
- Výbor rozhodl zpřístupnit elektronické Starto všem
- Výbor jedná s brněnskou kongresovou agenturou o možnosti uspořádání UK 2026
- Výbor vybral pro svazovou konferenci 2024 Českou Třebovou
- Výbor aktualizuje mapu klubů na svazové doméně

TEJO aktuale

- La **79-a Internacia Junulara Kongreso** okazis kune kun ILEI-konferenco en Lignano Sabbiadoro, Italio, tuj post UK en Torino.
- **Nova estraro de TEJO 2023/2024:** Tyron Surmon (prezidanto), Snehağa Venkatesh (vicprezidanto), Kubof Hromoslav (ĝenerala sekretario), Patricio Augustin Iglesias (kasisto), Abhinav Varma, Ada Florence Iracadukunda (estraranoj).

■ La junulara gazeto **Kontakto** havas novan redaktoron Karina Oliveira.

■ En junio, TEJO-anoj vojaĝis al Strasburgo por partopreni en **Eŭropa Junulara Okazaĵo**.

■ TEJO kaj la Konsilio de Eŭropo serĉas 26 junulojn por partopreni **studsesion en Hungario** pri interkultura komunikado (5.-11. 11. 2023 en Budapeŝto)

■ **La juna vivo** - malnova junulara gazeto - estis skanita kaj troveblas en la reto en la gazetoteko:

<http://www.gazetoteko.com/jv/>

■ **Junulara E-Semajno JES** okazos inter la 27-a de decembro 2023 kaj la 3-a de januaro 2024 en Storkow, Germanio.

■ TEJO serĉas novan redaktoron por la **Movada Rubriko**.

■ TEJO serĉas **konfidenc-personon**, kiu estus kontakto-punkto por interes-konfliktoj kaj aliaj interhomaj konfliktoj

PETSKRIBO

por la reaperigo de Esperanto-kursoj

En la retejo **Duolingo** restis Esperanto-kurso sole por anglalingvanoj, dum tiuj por hispan-, portugalo- kaj franclingvanoj malaperis kaj la preparata por la mandarena (ĉina) eĉ ne aperis. La menciitan petskribon, kreitan reage al tiuj ŝanĝoj, ni invitas subteni kaj disvastigi. Ĝi estas legebla kaj subskribebla ĉe la retejo Change.org:

<https://www.change.org/p/for-the-duolingo-esperanto-courses-por-la-esperanto-kursoj>

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

06940 členství ČES
06941 členství UEA
06942 předplatné Starta bez členství
06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
06944 poplatek UK
06945 kongres EEU
50400 komise pedagogická ILEI
50401 písemný kurs začátečníci
50402 písemný kurs pokročilí
50404 Paroliga kurso
50405 svazové zkoušky
50800 sekce nevidomých LIBE
50900 sekce zdravotníků UMEA
51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
51200 sekce informatiky
70100 komise pro tisk a inf.
80200 ediční fond
80300 propagace v tisku
80400 fond Tilio
80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradíte na účet u **Raiffeisenbank**, č. ú. **101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1450,- Kč (*970,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://sezonoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

**Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
54. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč
Členská evidence a změny adres:**

**p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,
svubova@esperanto.cz**

**Uzávěrka příštího čísla:
15.11.2023**

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 54-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)
elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.11.2023**

ISSN 1212-009X

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.**

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj de
E-Klubo en Brno - gastoj bonvenas!

Fizikaj renkontoj en Hybešova 65a alternas kun
la virtualaj. <http://esperantobrna.cz>
info: brno@esperanto.cz

2023

2023-09-08/10 Kunveno en E-muzeo Svitavy

Info: dvor.libuse@seznam.cz

2023-09-29/10-01 ĈEA-konferenco en Suda
Moravio, nome en Prudká apud Tišov

Info: komitato@esperanto.cz

2023-10-23 Diskuto pri Esperanto en la urba
biblioteko Benešov

Info: leonarda.chaloupkova@esperanto.cz

2024

2024 septembro aŭ oktobro

ĈEA-konferenco en Česká Třebová

Střední škola technická a dopravní Gustava
Habrmana Česká Třebová

Info: komitato@esperanto.cz

Bude UK v Brně?

Ve dnech 4. – 5. září 2023 navštívili Brno
Dorota Rodzianko a Petr Baláz z UEA, kteří
si v doprovodu členů EK Brno, místní
Centrály cestovního ruchu a zástupců ČES
prohlédli vhodné prostory pro konání
některého z příštích UK.



**Více informací se dozvíte na konferenci
ČES v Prudké 28. 9. – 1. 10. 2023**



26-a renkontiĝo de eksaj tendaranoj en Lančov



Salono Zamenhof en Torino



Salutparolo el Svitavy al la uzbeka Internacia Tago de Teo



Peter Baláž en Torino prelegas pri robotoj kaj artefarita inteligento



En Torino: Prelego pri misinformado



Ludoj kun diablo en Torino dum UK